

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Ĝiro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

KIO OKAZAS EN NEDERLANDAJ JUNULARMEDIOJ?

Bonintencaj planoj faritaj dum konferenco en Amsterdamo.

Kiel ajn malgranda Nederlando estas, kiom ajn malgranda ĝia enloĝantaro, malgraŭ tio ekzistas en ĝi tiom da grupoj kaj kategorioj de diversopiniantaj personoj, ke eksterlandanoj ofte ege surpriziĝas kaj sin demandas ĉu tio estas necesa. Responde al tio ili estas superŝutataj per lavango da etaj diferencoj, kiuj-laŭ veraj Nederlandanoj, denature tre organizemaj-kondukas al formado de ĉiaj unuiĝoj, kiel ekz. 5 organizaĵoj, kiuj gvidas la radiodisaŭdigojn, proks. 13 politikajn partiojn, 4 sindikatojn kaj tiel oni povas daŭrigi. Ne estas mirinde, ke rilate al la Esperanto-movado prezentigas la sama situacio. Entute ekzistas 5 landaj Esperanto-unuiĝoj, nome L.E.E.N. (La Estonto estas Nia), kiu reprezentas la „neŭtralajn“esperantistojn, aliĝinta al U.E.A.; A.L.E.-F.L.E. (Asocio de Laboristaj Esperantistoj-Fidu La Estontecon); N.K. (Nederlanda Katoliko); K.U.N.E. (Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj) kaj Nosobe (Nederlanda Societo

de Blindaj Esperantistoj). Tiuj ĉi unuiĝoj kunlaboras en N.C.K.E. (Nederlanda Centra Komitato Esperantista), kiu reprezentas la nederlandan esperantistaron antaŭ ŝtataj kaj publikaj instancoj kaj okupas sin pri ĉiuj taskoj, kiuj estas komunaj al la partoprenantaj unuiĝoj. Krom tio la 5 organizoj kunlaboras en la „Generala Nederlanda Esperanto-Ekzamena Komitato“ kaj en la oficejo „Esperanto de la Instruado“. Se oni nun havas la impreson ke la stato de la esperantismo estas tute sana, tiukaze oni sufiĉe eraras. En nur kelkaj rilatoj oni povas esti tre kontenta, ekz. pri la Esperanto-ekzamenoj. Sed farante kelkajn paŝojn sur la tereno de la propagando, fakte ankaŭ apartenanta al „la taskoj, komunaj al la partoprenantaj unuiĝoj“, tiam oni jam baldaŭ renkontas barilojn (nevolo, konkurenco ktp.), kiuj malebligas sukcesplenan kaj efikan propagandon.

(daŭrigo sur la 2a paĝo)

PARENTEZE.

Pri Kongresoj.

(sed ne por propagandi).

Jes, mi tuj diru: tio, kion mi hodiaŭ miaŭas, ne celas propagandi niajn - belajn - kongresojn. Fari tion ja ne estas mia tasko; sed tamen mi skribu pri kongresoj, ĉar ili ja estas aktualaj nun!

Pri la I.J.K.-oj, kiujn mi dum mia mallonga vivo jam vizitis, mi povus rakonti multe, tiom multe, ke T.E. J.O. povus eldoni specialan „kongresnumeron” de La Juna Vivo. Ĉar ĝi ne faros tion, (mi bone konas nian kasiston), mi nur prezentu al vi la sekvantan epizodon:

Okazis en ne, prefere mi ne diru - do ie, iam, kie oni kutimas pasigi la noktojn en tre malmolaj litoj, (ne estis en Aŭstrio!) kies matracoj krome estis tre „montetaj”. Sekve de tio la kongresanoj longan tempon turnis sin en ĉiaj pozoj inter la malebenaĵoj antaŭ ol endormiĝi.

Dum iu nokto mi vekigis kun doloraj membroj. Por fari almenaŭ ion, mi atente aŭskultis la dormadon de miaj samsortuloj. Jen kelkaj, kiuj diligente ronkis, jen kel-

kaj, kiuj rakontis neklare siajn korsekretojn. Tre interese!

Jen vidu! Eksidas mia hispana najbaro; rekte, kvazaŭ ĉevalrajdante. Nur la ĉevalo mankis. Ĉar li eligas dolorĝemajn sonojn, mi demandas al li: „Ĉu vi estas malsana?”

„Ne”, venas la respondo, „Mi nur iomete ripozas!!!”

Feliĉe la noktoj estis tre mallongaj: de la 1-a meznokte ĝis la 5-a frumatene!

Jam proksimas nia nova kongreso. Kvankam mi pro la sufiĉe altaj kostoj unue hezitis viziti nian 9-an, mi nun, leginte la ege allogan programon, certe iel iros al Wörgl. Imagu la belegajn ekskursojn, i.a. per pendfervojo, kaj - la viziton al ŝlimbordbanejo! Naĝi en la ŝlimo, ho, al tio mi jam sopiras ek de mia plej frua bubeco!! Mi partoprenos, nun, aŭ neniam!!

(Se vi eble pensus tion: ĉi tiun prozon mi ne verkis propagandcele).



(daŭrigo de la 1a paĝo)

En Nederlando ekzistas ankaŭ pluraj junularaj grupiĝoj esperantistaj, parte aliĝintaj al la landaj unuiĝoj, parte memstare agantaj. Estas necese, ke diversaj estu nomataj, ĉar precipe pri ili temas en la venontaj linioj; ili estas Ju-Ko (Junular-Komunumo de A.L.E.-F.L.E.), L.E.E.N.-Junulargrupo „Deventer”, (loka), Ekstazo Leeuwarden (Loka kaj memstara), S.A.T.-Junulfako kaj la ned. sekcio de T.E.J.O.

Estas la estraroj de la nomitaj

grupiĝoj, kiuj antaŭ monatoj kontaktis unu kun la alia por interŝanĝi opiniojn pri la eblecoj por kunlaboro, kunlaboro en la plej vasta senco. Sekve de ĉi tiuj antaŭaj preparoladoj kunvenis en Amsterdamo je la 28a de februaro kaj la de marto la delegitoj de la 5 grupoj por detale ellabori la gvidliniojn, laŭ kiuj per komunaj fortoj povos esti laborataj. Nome de TEJO ĉeestis la prezidanto Tammo Kanter kaj la provizora peranto Koos Kranenburg. Dum ĉi tiu

kunveno, en kiu regis la vera esperantista spirito, en kiu prezentigis la bona volo kaj toleremo, tiom necesa, akceptigis la ĉisuba grava Finkonkludo:

Subskribintoj, prezidanto de kaj delegitoj al la kunlaborkonferenco, okazinta la 28an de februaro kaj 1an de marto 1953a, esprimas la deziron, ke ekzistu firma kunlaboro inter la nederlandaj esperantistaj junulargrupigoj, bazita sur la jenaj principoj:

A. La partoprenantaj organizoj ne kontraŭu la interesojn de Esperanto;

B. La partoprenantaj organizoj respektu la tendencon kaj starpunkton de la aliaj organizoj;

C. La partoprenantoj inter si ne konkurencu por forpreni anojn unu de la aliaj;

Ĉ. Laŭproporcie la farota laboro kaj ĝiaj kostoj estu egale dividitaj;

kaj proponas al la esperantistaj junulargrupigoj en Nederlando:

A. la fondiĝon de kunlaborkomitato (KK) en kiu kunsidas la delegitoj de la partoprenantaj organizoj; ĉiu delegito havu unu voĉon; la organizoj, havantaj malpli ol 50 membrojn, havu unu delegiton; pli grandaj grupigoj havu du delegitojn. La KK kunvenu minimume unu fojon jare; ĝi decidu pri ĉiuj aferoj, kiuj rilatas la kunlaboron.

El la KK elektigu taga estraro, konsistanta el tri personoj, nome Amsterdamo, la unuan de marto 1953a.

La delegitoj:

por TEJO: Tammo Kanter - Koos Kranenburg

Ju-Ko: Manna Beyne-van Os

LEEN-JG: Ab Kraaijenzank

Ekstazo: Felix H. Kat

SAT-JF: Hans ten Hagen

Provizora taga estraro, konsistanta el Roel Kraefft (prez/red.), Tammo Kanter (sekr/kasisto, Lombokstr. 2, Leeuwarden) kaj Hans ten Hagen (prop. gvid.) nun preparas la venontan konferencon de la delegitaro, okazonta dum la landa kunveno de nia ned. sekcio dum pentekosto. Tie do montriĝos, ĉu la Fin-

prezidanto/redaktoro, sekretario/kasisto kaj propaganda gvidanto. La taga estraro havu la taskon gvidi la efektivigon de la decidoj de la KK.

B. Por finance ebligi la laboron de la KK ĉiujare estu fiksata kotizo. Por la kuranta jaro la kotizo sumigu po g. 0,50 por ĉiu membro jare.

C. Kunlaboro okazu sur propaganda tereno en la plej vasta senco. La KK direktu sian propagandon al ĉiuj medioj junulaj, ne atentante strukturon aŭ celon. La konferenco akceptis ĉiujn ĉi rilatajn proponojn al ĝi faritajn kiel deziresprimojn pri kiuj la KK post definitiva instaligo decidu.

Ĉ. La partoprenantaj organizoj memstare varbu siajn anojn en samtendencaj Esperanto-organizoj. Por varbi la ne-organizitajn esperantistojn KK eldonos komunan varbilon.

D. La KK organizu unu fojon jare renkontiĝon. Dum ĉi tiu renkontiĝo okazu la fakaj kunsidoj de la ned. sekcio de TEJO kaj SAT-Junulfako kaj la jarkunveno de KK.

E. Dum jaroj, en kiuj la internaciaj junularrenkontiĝoj de TEJO kaj SAT-Junulfako okazas tiom malproksime, ke granda parto de la nederlandaj junaj esperantistoj ne povas partopreni, la KK okazigu komunan internacian someran renkontiĝon.

F. Por plifirmigi la internan kontakton inter la partoprenantaj organizoj la KK eldonu periodan bulleton kun informa karaktero.

La prezidanto:
Roel Kraefft.

konkludo estas ĝenerale akceptebla por la membraroj de la partoprenantaj organizoj. Se ĝi estos aprobata, ni povas diri ke ni en Nederlando estas sur la bona vojo, la vojo, kiu gvidos al brila estonteco de la ned. Esperanto-movado, en kiu kulminos reciproka kompreno kaj estimo kun sukceso post sukceso!

T. K.

LABOREMO.

Jen temo, kiu pro ĝia elstara graveco meritas nian plenan atenton. Laboremo ja tuŝas nian vivon je multaj flankoj. Ĝi ludas rolon ne nur en la privata vivo, sed ankaŭ en politikaj, religiaj kaj unuigaj grupigoj ĝi prenas gravan sidejon.

En la privata vivo ni ĝenerale ne bezonas apartan instigon por aktive labori. Se ekzistas la serioza deziro atingi la por ni plejeble altan vivnivelon, ni memkompreneble batalas por tiu idealo.

Tamen en suprenomita grupigoj — en pli alta grado ĉe unuigaj grupigoj kun veraj idealoj - tiu instigo jes tre necesas, ĉar en ili la memintereso (egoismo) fakte estas ekskludata, speciale en unuigoj.

Kaj pro tio la serioza deziro al efektiviĝo de la idealoj kaj eĉ signifas paŝo al ĝi - la efektiviĝo - ne sufiĉas, sed estas bezonata entuziasmo, kiu kondukas al laboremo. Se en iu unuigo tiu entuziasmo estas nesufiĉa por ebligi kontentigajn progresojn (kaj en la pliparto el ili la situacio estas tia!), la gvidantoj devas ade klopodi alceli la entuziasmon kaj instigi la membrojn al aktiva kun-laboro. Tamen tiu tasko preskaŭ estas problema!

Koncentrigante nin nun je la Esperanto-movado, ni tuj devas konstati ke la skizita situacio en la du antaŭlastaj frazoj ankaŭ grave koncernas ĝin!

Ni povas diferencigi la membrojn de la E-unuigoj en la jenaj pli gravaj kategorioj:

A. membroj, kiuj pro sia entuziasmo malgraŭ studoj ktp. apartenas al la aktivuloj kaj al la gvidantoj;

B. membroj, kiuj kvankam ne entuziasmaj, jes interesiĝas en la E-

movado kaj ties idealo, sed kiuj ne povas trovi tempon por aktive labori por ĝi;

C. membroj, kiuj perdis la entuziasmon kaj kun ĝi la interesiĝon, ofte pro malrapida evoluo de la E-movado, sed kiuj tamen restis anoj;

Ĉ. membroj, kiuj ne scias kiel kontribui al la unuiga laboro.

Estas precipe la grupoj B kaj Ĉ al kiuj ni pensis, kiam ni skribis pri „akceli entuziasmon kaj instigi al kunlaboro.”

La postenoj, gravaj kaj malpli gravaj, kiuj estas divideblaj en unuigoj, speciale en internaciaj, estas pli multaj ol oni ĝenerale supozas.

Ekzemple estas menciindaj:

1. Estraraj postenoj kun diversaj helpfunkcioj;
2. redakciaj, administraciaj kaj ekspedaj postenoj; la ekspedado certe povas esti prizorgata de pluraj personoj. Nur malmultaj laŭvalore taksas la temporaban laboron, kiun postulas la ekspedado de E-gazetoj en grandaj unuigoj;
3. perantaj postenoj; la perantoj de int. unuigoj en la respektivaj landoj ofte bezonas helpantojn por ke estu disvolvata aktiveco vasta;
4. regionaj perantoj;
5. postenoj en la diversaj servoj, kiel Informaj (Propagandaj) Servoj, Dokumentado kaj Gazetarservoj, vojaĝservoj, korespondservoj k.s., en kiuj pluraj personoj povas trovi laboron.

La problemoj tamen estas, kiel TROVI tiujn anojn!

La nombro da Esperantistoj, kiuj povas okupi la nomitajn postenojn kompreneble ne sufiĉas. Pli da mem-

(Daŭrigo sur la 5a paĝo)

En la korto de la lernejo la infanoj ludas en kvar grupoj. Nur unu knabeto, Ludoviko Lazaro Zamenhof staras en pensoj ĉe la fenestro de la koridoro. Li rigardas al la ludantaj geknaboj.

- Kial vi ne ludas kun la ceteraj infanoj? - demandas lin la instruisto. Pri kio vi pensadas?

- Mi pensadas pri tio, kial ne ludas la infanoj kune? Kial ili formas kvar grupojn?

- Kia demando! diras la instruisto. Vi ja scias, ke nian lernejon vizitas polaj, judaj, rusaj kaj germanaj infanoj. Ili ne komprenas unu la alian, do ili ne ŝatas ludi kune.

- Mi pensas pri tio, ke iu devus pretigi lingvon, kiun ĉiu komprenas. Tiam ĉiuj infanoj de la mondo povos ludi kune.

- Nu, vi pensadu diligente. Vi estos fama, se vi pretigos tian lingvon.

Ĉi tiu paroladeto okazis antaŭ preskaŭ naŭ-dek jaroj en la pola urbeto Bialystok.

Ludoviko estis filo de pola lingvo-instruisto kaj kiel okjara infano li jam pensis pri lingvo, kiun ĉiu facile povas lerni kaj paroli. Tiam oni bone povos kompreni unu la alian, oni povos ami unu la alian.

Poste Ludoviko Zamenhof vizitis la gimnazion. Eĉ ĉi tie li ĉiam pensadis pri internacia lingvo. En 1878a li estis preta kun sia internacia lingvo,

sed li ankoraŭ ĉiam plibonigis ĝin.

Fine, post multaj malagrablajoj kaj malkomprenoj Dr Zamenhof eldonis la unuan gramatiklibron de Esperanto.

La celo de Esperanto estas: plifaciligi la internaciajn interrilatojn per tia helplingvo, kian ĉiu facile povas lerni. Esperanto ne volas forpuŝi aŭ anstataŭi la naturajn lingvojn, sed la Esperantistoj penadas, ke ĉiu homo lernu ĝin krom sian gepatran lingvon.

De post la apero de Esperanto pasis preskaŭ sepdek jaroj. Okaze de Esperanto-kongresoj kunvenas Esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo kaj ili perfekte komprenas unu la alian. Anglo kun ĉino, nederlandano kun ĉeĥoslovako, hungaro kun franco, germano kun japano paroladas, korespondadas, diskutadas sen ia malfacileco.

La genia verkisto de Esperanto Dr Ludoviko Lazaro Zamenhof mortis la 14an de aprilo 1917a. Li ankoraŭ vidis la triumfon de sia verko.

Sur la kvin kontinentoj vivas multaj Esperantistoj, kiujn disigas la landolimoj kaj maroj, sed unuigas la grandioza verko de Dr Zamenhof: LA LINGVO ESPERANTO.

Karlo G. Lázár,
Budapest VI. Eötvös u. 29.
Hungarujo.

(Daŭrigo de la 4a paĝo)

broj devas havi okazon partopreni la unuigan laboron kaj esti interesigataj. Jen grava tasko por niaj Egazetoj. Ili devas forte instigi, ke oni faru verkaĵojn; ili devas enhavi liberan tribunon en kiu la legantoj

povas esprimi siajn rimarkojn, dezirojn kaj riproĉojn. Por ankaŭ influu tiujn, kiuj staras pli malproksimaj de la kun-laboro, ĉi tiuj anoj havu okazon helpi tiel ke tio postulas nek gravan kapablon, nek

(Daŭrigo sur la 7a paĝo)

KIEN EN 1953a?

Internaciaj kongresoj:

- 25.7.-1.8. 38a kongreso de UEA en Zagreb, Jugoslavujo.
 25.7.-1.8. 26a kongreso de SAT en Sheffield, Anglujo.
 3.8.-10.8 9a **INTERNACIA JUNULARKONGRESO EN WÖRGL, TI-ROLO, AŬSTRUJO.**
 12.8.-16.8. 24a kongreso de IKUE, Lourdes, Francujo.

Landaj kongresoj, kaj aliaj aranĝoj:

- Francujo:** 6-10 apr. en Koenigshofena junulgastejo kongreso por gejunuloj kaj geinstruistoj.
 10 apr. en Strasburgo „Restaurant de la Comédie” Esper. renkontiĝo.
- Nederlando:** 5-10 majo en Utrecht, Fervojistaj Kongreso.
Britujo: 22-25 majo en Bournemouth 34a brita kongreso de Esperanto.
 la 23an de majo de 16.30 ĝis 17.30 **JARKUNVENO DE TEJO**, (brita sekcio, samloke.
- Belgujo:** 23-25 majo en Antwerpen **BENELUKSA KONGRESO** de LEEN, Fl. L.E. kaj RBLE.
- Danujo:** 23-25 majo en Kopenhago kongreso de Danaj Esperantistoj.
Germanujo: 23-26 majo en Frankfurt a/M. GEA-kongreso.
Svedujo: 23-25 majo en Halmstad Sveda kongreso.
Nederlando: 23-25 majo en Elst (Utr). **KUNVENO de TEJO** (Ned. sekcio), **SAT-JF** (Ned. frakcio), **JU-KO** kaj aliaj nederlandaj junulargrupiĝoj.
- Germanujo:** 18-24 julio en Konstanz Internacia-Ferio-Semajno.
Danujo: 18-25 julio en Helsingør Intern. feriaj kursoj.
Danujo: 13 jul.-4 aŭg. arheologa tendaro por Esp. studentoj. Vidu informojn en la revuo.
- Aŭstrujo:** 23-26 julio en Klagenfurt Aŭstr. kongreso.
Jugoslavujo: 1- 8 aŭg. en Ljubljana konferenco de Esp. studentoj kaj altlern.
- Francujo:** 3-10 aŭg. en Kastelo de Grèsillon Intern. Kultura Semajno.
- Hispanujo:** 7-10 aŭg. en Bilbao Kongreso de Hisp. Esperantistoj.
Svislando: 9-16 aŭg. en Rüdlingen ĉe Schaffhausen Konferenco de Krist. Esp. Ligo Intern.
- Svedujo:** 9-16 aŭg. en Frostavallen-Hööi Sveda Somera Semajno. (Aliĝdato pasis).
- Britujo:** 22-29 aŭg. ĉe Heys Farm Gastejo, apud Clitheros, Lancs. S.B.E.T. Somera Lernejo.
- Italujo:** 5- 9 sept. in Como-Villa Olmo, 25a kongreso de Esp.
Svislando: 27 sept. en Rolle, 50 jara jubileo de SES.
Danlando: 18-25 okt. en Vejle aŭtunaj kursoj.

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO okazos de 18/7-24/7 '53 en Konstanz, Germanujo. Bonega turisma kaj kultura programo. Perfektiga Esperanto-kurso. Petu il. invitilon ĉe IFS Esperanto, KONSTANZ, Grüngang 8. Germanujo.

DENOVE INTERNACIA ARKEOLOGIA TENDARO EN DANLANDO.

Dana ŝtato donis dum la 4 lastaj jaroj 25000 d.kr. al arkeologiaj tendaroj por esperantistaj studentoj.

Dana Internacia Studentkomitato aranĝos kunlabore kun Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj denove internacian arkeologian tendaron.

Pasintjare tre malmultaj aliĝis, sed ĉar la pago ĉi jare estas reduktita ĝis nur 20 d. kr. - 3 us. dolaroj, oni atendas multajn partoprenantojn. La tendaranoj elfosos vikingan fortikaĵon apud urbo Hobro en Nordjuto. La aranĝo komenciĝos la 13-an de julio. Tiun tagon le partoprenantoj alvenu Kopenhagon. Vespere okazos interkona kunveno en Studenta Esperanto-Klubo, kaj la sekvantan tagon oni vizitos vidindaĵojn en Kopenhago, i.a. oni vizitos Nacian Muzeon, kaj tie okazos prelego en esperanto pri la rezultatoj de dana arkeologio. Vespere vizito al Tivoli - fama amuzejo en Kopenhago, kaj pli poste forveturo al Jutlando - kaj la vojaĝo inter Kopenhago kaj Hobro - tien kaj reen estas enkalkulita en la prezo - kie la arkeologia laboro komenciĝos. Oni laboros 6 horojn tage, loĝos kaj manĝos en hotelo. Ofte okazos prelegoj kaj ekkskursoj. La naturo en la ĉirkaŭaĵo de Hobro estas belega, kaj bona banstrando es-

tas tre proksima. La 4-an de aŭg. la tendaro finiĝos. Partoprenantoj, kiuj tion deziras, povos post la tendaro viziti la internacian studentcentron „Hald” apud urbo Viborg. Kvartaga restado tie - inkluzive vojaĝon de Hobro al Hald - tien kaj reen kostos 73 d. kr.

Ĉiuj gestudentoj, altlernejoj (studintoj), seminarianoj k.s. povos partopreni la tendaron. Oni postulas ke la partoprenantoj flue parolu esperanton. Sed estas tre grave ke interesatoj tuj aliĝas. Se ne almenaŭ 15 partoprenantoj aliĝis antaŭ la 15. de majo, la tendaro ne okazos.

La dana ŝtato donis dum la 4 lastaj jaroj 25,000 d. kr. - 3500 us. dol. al tendaroj por esperantistaj studentoj, kaj estus domaĝe se tia aranĝo - pro manko de partoprenantoj ne povus daŭriĝi.

Do pripensu ĉu ne vi povas ion fari por stimuli la intereson por la 4. internacia arkeologia tendaro por esperantistaj studentoj.

Petu senpagan programon de **Dana Internacia Studentkomitato**, La Universitato, Sct. Pederstrade 19, Kopenhago K.

(Daŭrigo de la 5a paĝo)

grandan oferon. Ili trovos debitejon en la jam ĉe punkto 5a nomitaj servoj, kaj ne bezonas sin senti „maltvaloruloj”, ĉar de ilia kunlaboro dependas la ekzisteblecoj de tiuj servoj. Ke tiuj servoj estas treege gravaj, nienu povas nei! Personoj, kiuj komence okupis la iom pli malmulte signifajn postenojn, poste ofte pro la entuziasmo, kiu per tio ekkreskas, fariĝis la tre valoraj aktivuloj.

Sendube necesas ankaŭ, ke niaj organoj kun granda entuziasmo ra-

portas la progresojn en la E-movado kaj emfaze en la propra organizo. Grave estas, ke la laboremuloj vidas la rezultatojn de sia aktiveco. Tio postulas ofte ian taktikon de la gvidantoj.

Ĉar eble estas TEJO-membroj, kiuj demandas sin: Kiel mi povas kontribui al nia organiza laboro, ni volas trakti kelkajn klopodojn, kiujn la gvidantoj de TEJO jam faris por tiri ilin en tiun laboron.

(Daŭrigota)

NI MENCIAS NI RECENZAS

H. A. Appel: Esperanto Leerboekje, 2a parto. Prezo f 1.50, mendebla ĉe la kompilinto Bergen op Zoom, Z.O. Singel 5.

Evangelia Kantaro: Eldonaĵo de Kristliga Esperanto-förbundet, Verkmästarogatan 18. ÖREBRO, Svedujo. Prezo 2.50 sv.kr. + afr. por broŝ. ekz. La libreto enhavas 50 krist. kantojn kaj psalmojn, trad. el la angla, germana, sveda, dana lingvoj, krome La gajan Migranton kaj La Esperon de Dr L. L. Zamenhof.

Edmund Yardley: Tributo al Nobla Geniulo. Eldonis: Land and Liberty Press Ltd. 4 Great Smith Street, Londono S.W. 1. Anglujo. Prezo 4 ŝil. angl. + 3 pencoj por poŝtendo, aŭ 13 intern.r.k. afrankite. La libreto estas kompilita laŭ la funebraj paroladoj super la mortinta pensulo kaj ter-reformisto Usona, s-ro Henry George. La tradukinto, s-ro Francis Reynold Jones meritas laŭdon.

AVIZO.

La Esperanto-Societo en MULHOUSE atingis, ke la samurba turisma oficejo (Syndicat d'Initiatives) aldonu E-presaĵon al la ilustrita franclingva turisma gvidilo de ĝi publikigita. La direktoro de tiu S.I. promesis eldoni specialan ilustritan E-lingvan gvidilon, se la menciita E-presajo vekos sufiĉe da atento kaj intereso.

Samideanoj, skribu al la ĉi suba adreso, por ricevi la havindan gvidilon pri MULHOUSE, kun E-aldono. Sendu la adresojn de kvin el viaj konatoj, aldonante respondkuponon; ni sendigos al ili tiun tre efikan E-varbilon. Por ne forgesi, agu tuj!

„Esperanto-Servo Turisma” 24, Fbg de Riedisheim, MULHOUSE (Francujo).

Atentu! Atentu! Gvatemalo vokas vin!

Sub titolo „La infanoj de la mondo kantas” en Gvatemalo estas organizita de la Direkcio de Belartoj de la landa Edukministerio interlerneja konkursa prezentado de sceno kun folkloro kanto el malsama popolo. Tial oni vokas al kunlaborado.

Bonvolu havigi la jenon: a) muziknotojn por kanto kaj pianakompano, aŭ por plurvoĉa horkantado de iu folkloro nacia kanto;

b) ĝian tekston en la nacia lingvo; c) sub ĝi la legmanieron kun Esperanta ortografio; ĉ) la tradukon de la teksto en Esperanto; d) klarigojn pri la kanto; e) bildon de la regiona kostumo, kie ĝi estas kantata.

Oni reciprokos ĉiun sendaĵon. Sendigu la materialon al jena adreso: „POPOLKANTOJ”, Direccion General de Bellas Artes, Callejón Manchón, 14. GUATEMALA Cd (Guatemala).

Por akceli regulan ricevon de L.J.V. vi nepre plenigu la demandarojn kiuj ni aldonis al la Dec./Jan-ro.

ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekr-ejo: Lombokstr. 2, Leeuwarden, Ned.).

DANKESPRIMO. Rekompence al la multa laboro, kiun ŝi faris, la estraro sendis al F-ino N. Kool la verkon „Peer Gynt” de Ibsen.

PERANTOJ. La adreso de la nova provizora nederlanda peranto, Koos Kranenburg, estas Steenshuur 10, Leiden (Ned.). Ĉion rilate al la nederlanda sekcio oni sendu al li.

VOJAĜO AL WÖRGL. La ned. sekcio planas la vojaĝon per aŭtobuso al Wörgl. Kostoj: g. 50.— Pli detalaj informoj pri ĉi tiu vojaĝo venos en la baldaŭ aperonta bulteno.

JARKUNSIDO. Proponojn por la jarkunsido en Wörgl oni sendu antaŭ la 15-a de MAJO al la sekretario.


LA REZULTATO DE NIA FOTOKONKURSO. La gajnintoj de la fotokonkurso estas:

1. F-ino Lilli v. Waldowski el Berlino kaj
2. S-ro Joachim Schubert, el Schweningen (Germ.).

La senditaj fotoj estas tre bonkvalitaj. Pro la malmulta loko, pri kiu ni disponas, ni enpresigas nur unu foton. Ĝin faris f-ino v. Waldowski en la malnova parto de la urbo Aarhus, Danlando.



Se perdiĝis via informfolio, kiun ni kunsendis kun la Dec./Jan.-numero de L.J.V., por ke vi plenigu kaj resendu ĝin al via peranto, vi povas akiri novan, petante tion ĉe la sekretario!



KORESPOND- ADRESOJ

- Bulgario:** Dez. kor. k. pers. el Nederlando, Francio, Okc. Germanio kaj Svislando: S-ro Nikola Kolovski, v. Lehčevo, Mikajlovgr.
S-ro M. W. Koev, str. Ĉumerna 6. KAZANLIK, dez. kor. kaj interŝ. p. m. kun ĉiuj landoj. Li serĉas UPU el la tuta mondo.
- Italio:** 10-jaraj lernantinoj dez. kor. k. gelernantoj nederlandaj; skribu al Alunne di classe Vùc, Scula Rinnovata Pizzigoni, via Castellino da Castello 10, Milano.
- Francio:** Junaj liceanoj dez. kor. kun la tuta mondo, -ĉefe kun sam. en Hindujo, Ĉinujo, Sud-Afriko. Skribu al „Verda Klubeto”, Collège Turgot, rue Turbigo, Paris 3e.
Dez. kor. k. knabo: F-ino Marie-Louise Roussel (14 j.): adr. Collège, Laon (Aisne).

RAPIDA KALKULO KAJ ESPERANTO.

Esperanto-kronikisto ĉe „NORD ECLAIR”, nia amiko Lucien GILOTEAUX emas intervjui gravajn aŭ/kaj interesajn personojn. Jen lia rakonto pri la franca kalkulisto DAGBERT.

Lasttempe ni havis la plezuron paroli kun Maurice DAGBERT, rapida kaj pensa kalkulisto.

Li sciigis al ni, ke li bezonis la helpon de tradukistoj dum siaj publikaj prezentadoj en Svisujo kaj Italujo. Li tute nature aprobis niajn ideojn pri la Internacia Lingvo kaj petis detalajn informojn pri la maniero eldiri la ciferojn en esperanto.

Krome, Maurice DAGBERT bonvolis komuniki al niaj junaj gelegantoj, la sekvantan amuzan problemon: —

Petu amikon elekti tri-ciferan nombron kaj anonci ĝin al vi.

Poste, li multobligu tiun ĉi nombron per 7 (sep). La rezultaton de la operacio, li ankaŭ multobligu sed tiufoje per la nombro 143.

Eĉ antaŭ la komenciĝo de la kalkuloj de via amiko vi facile povos doni la definitivitan rezultaton.

Provu sola kaj vi tuj komprenos kial la afero estas ebla.

Leciono pri rapida kalkulo kontraŭ leciono pri Esperanto, la interŝanĝo ja estas originala!

L. G.

(laŭ „Nord Eclair”).

SOCIETY OF BRITISH ESPERANTIST TEACHERS.

La 22-29an de Aŭgusto en Norda Anglujo. En bela kampara regiono, alta kaj libera, okazos la feria stud-semajno de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj. La gasto-domo estas Heys Farm, apud Clitheroe, Lancs.

Kvankam plejparte por geinstruistoj kaj estontaj geinstruistoj, aliaj personoj estas bonvenaj.

La kosto de la semajno estas 5 pundoj anglaj, sen enirpago por alilanduloj vojaĝantaj tien de aliaj landoj.

Oni devas havi almenaŭ elementan scion pri Esperanto. Konversaciaj rondoj, paroladoj, sociataj aranĝoj kaj ekskursoj estos en la programo.

Ĉar la gastejo estas survoje al la konata Lago-Distrikto, oni konsilos laŭeble pri pli longa restado, kaj eventuale kunligos kun aliaj vizitontoj.

Skribu (kun respondukuponon) al

F-ino O. Robotham, 14 Wensley Road,
Stockton-on-Tees
Co. Durham.

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



LA BREMENAJ URBMUZIKANTOJ.

(fino).



Ili iris ĝis malfrua vespero. Tiam ili atingis arbaron proksime al Bremeno. Ĉar ili estis lacaj, ili deziris ripozi kaj dormi.

La azeno kaj la hundo kuŝigis sin sub granda arbo. La katino grimpis sur ĝin. La kokoflugis sur la plej altan pinton de la arbo. Ĝi volis rigardi ĉion. Ne tre malproksime ĝi vidis lumon. Ĝi rakontis tion al siaj kamaradoj. Ili pensis: „kie estas lumo, tie devas esti ankaŭ domo. En la domo ni povos ripozi kaj eble ankaŭ manĝi.”

Ili ek-iris kaj baldaŭ trovis la domon. La azeno rigardis tra la fenestro. Ĝi vokis siajn kamaradojn kaj ili kune rigardis en la ĉambron.

En la ĉambro sidis rabistoj. Sur longa tablo estis bonegaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. La rabistoj festis, ili multe manĝis kaj drinkis.

„Kikeriki” flustris la koko, „tio estus bona manĝaĵo por ni.”

Ili ĉiuj sentis grandan malsaton kaj deziris manĝi. Sed kiel forsendi la rabistojn el la ĉambro?

Ili pensis pensadis kaj faris planon.

La azeno metis siajn kruojn sur la fenestran breton. La hundo saltis sur la dorson de la azeno. La katino grimpis sur la dorson de la hundo, la koko eksidis sur la kapo de la katino. Ili volis muziki. Tial

la azeno blekis, la kokino miaŭis, la hundo bojis kaj la koko kikerikiis. Tiam ili sin ĵetis al la fenestro kaj rompis la vitron.

La rabistoj ektimis pro la terura bruo kaj ili kuris en la arbaron.

La kvar bestoj iris en la ĉambro, eksidis ĉe la tablo kaj manĝis. Kiam ili estis sataj, ili estingis la lumon kaj ekdormis.

Ĉirkaŭ noktmezo la domo estis tute malhela. Tion rimarkis la rabisto-estro. Li sendis unu rabiston al la domo. La rabisto foriris, sed li post ne longa tempo revenis. Lia vizaĝo estis tute pala, lia korpo tremis pro timo.

La rabisto-estro demandis lin:

„Nu, kion vi trovis en nia domo? Ĉu ni povas reiri?”

„Terure estas tie” respondis la rabisto. „Mi ne plu kuraĝas reiri. Aŭdu bone, kio okazis al mi. Mi kuris al la domo kaj eniris. Kiam mi volis fari lumon, terura sorĉistino gratis mian vizaĝon. Malantaŭ la pordo staris viro. Li pikis mian kruron per tranĉilo. Mi kuris el la ĉambro. Sed sur la korto estis monstro, kiu batis min tiel forte, ke mi falis. Kaj sur la pinto de la domo estis alia monstro, kiu daŭre kriis: „Ĵetu lin al mi! Ĵetu lin al mi!” Mi turnis min kaj forkuris. En nia domo estas nun tre danĝere. Mi kuregis, por savi mian vivon.”

La rabistoj longe parolis kaj pensadis, kion ili faru. Neniu kuraĝis reiri al la domo. Ili ĉiuj timis pro la danĝeraj monstroj, kiuj okupis la tutan domon. Ankaŭ la rabisto-estro timis reiri kaj tial ili ĉiuj dormis en la arbaro.

La bremenaj urbmuŝikantoj tre ĝojis pri sia nova hejmo. En la arbaro ili trovis manĝaĵon kaj neniu volis ilin mortigi. Ili estis tre feliĉaj kaj vivis kune en la domo.

Kaj ili vivas ankoraŭ, se ili ne mortis.

GFAM.

Solvo de la krucvorto-enigmo en la decembra-januara nro. La Juna Vivo (1952-1953).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	S	E	P	O	█	P	I	K	I
2	P	R	O	S	P	E	R	A	N
3	E	G	█	T	U	R	█	T	T
4	K	O	M	█	L	█	K	I	E
5	U	T	I	L	█	K	A	D	R
6	L	█	N	O	V	A	N	█	P
7	A	L	I	G	A	T	O	R	O
8	C	█	J	A	R	O	N	█	L
9	I	D	O	█	B	█	O	N	I

Ni lotis inter la solvintoj 3 premiojn.

La feliĉaj gajnintoj estas:

F-ino Ruth Bohl, Bremen/Germanujo, Lenneweg 15.

S-ro E. P. Crabtree, Wood View, Thistle Hill, Kirkheaton, Huddersfield, Anglujo.

Lutino Lino, Gr. Florislaan 14, Hilversum, Nederlando.